

Studaj kaj Porinfanaj Semajnfinoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 483, 1981.05.28 & 30

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La nova informilo pri la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia raportas pri la kultura aktiveco de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds per prezento de la domoj de ĝia gastejo Edmond Privat. Tio devigas nin regule raporti, pri la kursoj, kiuj disvolviĝas en tiuj ĉi domoj.

A.- Dum la aŭtuna, vintra kaj printempa sezonoj semajnfinoj altiris la studemulojn, kiuj volas lerni esperanton aŭ lertiĝi en ties praktiko. La partoprenantoj alvenas komence de la sabata posttagmezo, kaj formiĝas kvar klasoj. Ĉiufoje ripetiĝas la sama enkonduka kurso aŭdvida, kiu komprenigas, kio fakte estas esperanto vortfarade kaj donas tre solidan elparolan fundamenton. Ekzistas tri versioj de tiu ĉi kurso, unu por la franclingvanoj, unu por la germanlingvanoj kaj unu por la itallingvanoj. Tiel svisoj el ĉiuj lingvopartoj de la lando povas profite sekvi tiun bazan ses-lecionan instruadon, kiu ankaŭ allogas francojn, germanojn kaj aŭstrojn kaj italojn.

Cl.- Samtempe tri aliaj klasoj funkcias. Unu grupigas la esperanto-komencantojn, kiuj ĝenerale perkoresponde lernas la lingvon kaj sentas la bezonon lertiĝi en la konversacia arto. Perbilda instruado montriĝas tre fruktodona por ilin paroligi. Dum aro da radio-prelegoj ni provos komprenigi, kiel oni povas paroligi komencantojn pere de bone elektita bildmaterialo kaj ĉefe pere de bone programita metodiko, kiu konsistas antaŭ ĉio el ludoj.

A.- Alia klaso grupigas tiujn, kiuj jam sufiĉe flue parolas la lingvon, sed kiuj deziras pliprofundigi siajn konojn. Restas utila la perbilda instruado, ankaŭ helpas la aud-vida, same kiel la atenta studo de beletraj tekstoj. Anstataŭ tradukoj estas proponataj stil-ekzercoj. Kial ne tradukaj ekzercoj? Ĉar tradukado estas malfacila arto, kiun nur povas sukcese praktiki tiuj, kiuj vere majstras en la lingvo, kaj ankaŭ ĉar Svislando estas plurlingva lando, kaj oni devus formi tiom da tradukgrupoj, kiom da lingvoj. En tiuj stilekzercoj, kiuj pli efikas ol traduk-ekzercoj, oni provas plurmaniere esprimi saman ideon. Anstataŭ diri "li venis per la trajno" oni ankaŭ povas ekzercigi diri "li veturis trajne" aŭ eĉ "li trajnis", sed estas samtempe grave ek-konscii, ke gramatike ekvivalentaj frazoj stile entenas nuancojn, kiujn oni devas lerni percepti.

C1.- Fine en la supera klaso oni intimiĝas kun la historio de esperanto kaj de interlingvistiko, kun la literaturaj ĝenroj en esperanto kaj kun niaj verkistoj. Aliajn fojojn oni faras gramatikajn ekzercojn celante plenan ellernon de la lingvo.

A.- Tiuj ĉi Studaj Semajnfinoj, kiuj ĝenerale okazas la lastan plenan semajnfino de la monato, ofte grupigas pli ol tridek studemulojn, inter kiuj ĉiam troviĝas novaj tutkomencantoj.

Cl.- Ĉar oni povas feriadati en la gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, tre ofte feriemuloj profitas la okazon komenci aŭ konkludi feriadon per partopreno en studa semajnfino, tial tre ofte ne nur svisoj partoprenas en ili. Tra la kanalo de Svisa Radio Internacia estas eble ricevi la kalendaron de la venontaj studaj semajnfinoj.

A.- La ĉefa problemo, kiun nuntempe alfrontas la organizantoj de tiuj ĉi semajnfinoj, ne estas la konstanta varbado de nova publiko, sed la formado de la necesa instruistaro. Tio ĉi estas ĝenerala problemo, por ĉiuj organizantoj de similaj aranĝoj. Tial estas organizataj pedagogiaj semajnfinoj. La venonta okazos dum tri tagoj en la pentekosta plilongigita semajnfino, kaj ĝi estos dediĉita al la perbilda instruado de esperanto. Kiel diras la informilo pri tiu ĉi aranĝo, "konversaciigi esperanto-lernantojn estas kompleksa tasko. La perbilda instruado montriĝas tiurilate ege fruktodona, kondiĉe ke ĝi baziĝu sur preciza metodiko. Dank' al tiuj pedagogiaj seminarioj tiaj precizaj metodikoj diskoniĝas, kaj Kultura Centro Esperantista povas sin ĉirkaŭi de kompetentaj kunlaborantoj.

C1.- Alia tipo da semajnfinoj grupigas infanojn, kiuj parolas, lernas aŭ deziras lerni esperanton. Deko da pedagogoj kaj gejunuloj gvidas la aktivecojn, kiuj efektiviĝas en grupoj laŭ la aĝoj kaj laŭ la lingvo-kapabloj. Aĝe la infanoj estas dividitaj tiel: etuloj: ekde la 5-a jaro ĝis inkluzive la 8-a; mezuloj: ekde la 9-a ĝis inkluzive la 11-a; granduloj: ekde la 12-a jaro ĝis kiam oni ne sentas sin plu infano. Lingve la infanoj estas grupigitaj kiel esperantoparolantoj, esperantolernantoj kaj esperantokomencantoj. La semajnfino povas esti la unua kontakto kun esperanto.

A.- Tiuj semajnfinoj por infanoj havas plurajn celojn. Ili unue celas esperantigi la idojn de la esperantistoj. Estas sociologia fakto, ke la plimulto de la gefiloj de la esperantistoj seninteresiĝas pri esperanto, ĉar la movado ne kapablis sin montri alloga. Kontraŭe ĝi ŝtelas for la patron aŭ estas ofte la simbolo de io nekomprenebla, senviva. Tiuj semajnfinoj donas tute alian ideon al la infanoj, kiuj ilin frekventas. La idealo estus, ke ili povu disvolviĝi paralele al aranĝoj por plenkreskuloj. Tion ĉi kelkfoje efektivigis Kultura Centro Esperantista okaze de gravaj Kulturaj Semajnfinoj, sed mankas sufiĉa taĉmento da kunlaborantoj por ĝeneraligi tiun ĉi sistemon, ĉar ankaŭ la prizorgantoj porinfanaj ŝatas partopreni kulturajn aranĝojn.

Cl.- Estas interese konstati, ke infanoj, kiuj partoprenis antaŭ kelkaj jaroj infan-semajnfinojn, nuntempe ekaktivis kiel kunlaborantoj.

A.- Dua celo de la semajnfinoj por infanoj estas helpi la lernejojn, kie esperanto estas instruata. Por la gelernantoj, dank'al tiuj renkontiĝoj, ekzistas praktika ebleco ekuzi la lingvon en reala situacio. Esperanto ĉesas esti abstraktaĵo. Amikecoj eksterlernejaj kreiĝas, kiujn ofte konkretigas interŝanĝoj de leteroj kaj reciprokaj invitoj feriadi ĉe la esperanto-amiko. Tiucele ni provas amikigi la infanojn el malsamaj lingvo-regionoj, ĉar nur pere de esperanto ili povas vere rilati.

Cl.- Tria celo estas doni al infanoj eblon, kiuj povas praktiki esperanton nek hejme, nek lerneje, tamen intimiĝi kun ĝi okaze de renkontiĝoj. Se ili esprimas la deziron lerni la lingvon, ni proponas al ili perkorespondan kurson kaj metas ilin en kontakto kun esperantisto samloka, kiu helpu ilin.

A.- Dum tiuj semajnfinoj la infanoj ne sekvas veran tradicion kurson de esperanto. Ili ĉefe ludas per pilko, konkursas, manlaboras, lernas kantojn. Kaj konstante ili lernas, kiel nomi la ludobjektojn en esperanto, kiel fari demandojn, kiel nombri, ktp. Estas neimageble kiom da vortoj kapablas asimili infanoj en unu sola semajnfino, se la pedagogoj sin esprimas nur en esperanto, en lingvaĵo simpla,.

C1.- Okaze de privilegiitaj momentoj oni grupigas la infanojn lingve samnivelajn por parolaj ekzercoj aŭdvidaj aŭ perbildaj

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*